

Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj por Komerco kaj Progreso

Claude Gacond, 77-a radioprelego, 1964.05.13 & 16

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la **Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por la Komerco kaj Progreso**. Vi aŭdas Claude Gacond.

Vi certe scias, ke de la 23-a de marto grupiĝis en Ĝenevo proksimume 2300 delegitoj reprezentantaj 123 ŝtatojn, tio sub la iniciato de Unuiĝintaj Nacioj, por progresigi kaj kunordigi la internaciajn komercajn rilatojn.

Se ni volus trovi difinon al tiu grandega kaj histori-signifa delegitara renkontiĝo interŝtata, tiu, kiu ŝajnas al mi plej taŭga, estus : la mondo de la riĉuloj renkontiĝas kun tiu de la malriĉuloj.

Legante la raportojn pri tiu konferenco oni eble havas la impreson, ke en ĝi oni multe parolas kaj ne facile trovas akordiĝeblecojn. Tamen ni ne forgesu, ke tiu Konferenco ne povos subite solvi la sociajn problemojn, kiuj dividas nian mondon en riĉaj kaj privilegiaj regionoj, kaj terure subevoluintaj regionoj. Por montri al vi, kiom oni parolas, mi mencios, ke nur dum la unua semajno tiu Konferenco produktis 85 tunojn da protokoloj. La paperfabrikoj, la tajpistinoj, la tradukistoj, kiel vi konstatas, ne senlaboras ! Troabundeco da raportoj ofte malprogresigas debatojn, ĉar estas malfacile trovi la perlojn inter amaso da sensignifaj komunikaĵoj. Sed kion fari, ni vivas en la erao de la papero !

La ĉefa zorgo de la konferencanoj estas solvi la problemon, kiu hodiaŭ maltrankviligas ĉiujn klarvidantojn : la kreskantan mizeron de la malriĉuloj kaj la kreskantan potencon de la riĉuloj.

Hodiaŭ 87 procentoj de la riĉaĵoj de la tero estas en la manoj de 17 procentoj de la homoj. La limoj inter la riĉaj kaj mizeraj landoj skeme dividas la mondon en industriaj kaj neindustriaj landoj. La duaj ĉefe vivas de eksportado de siaj krudaj varoj kaj de sia agrokultura produktado, dum la unuaj vendas manufakturaĵojn. Nu, de kvindek da jaroj la prezoj de la krudaj materialoj konas fortajn fluktuojn ; ilia ĝenerala tendenco kondukas al prez-malaltiĝo. Kontraŭe la prezoj de la manufakturaĵoj senĉese plialtiĝas. Tio, rapide dirite signifas, ke la malriĉaj landoj jaron post jaro malriĉiĝas, dum la riĉaj landoj jaron post jaro pliriĉiĝas.

La teknika helpo alportata de industriaj landoj, kaj inter ili troviĝas Svislando, al ekonomie subevoluintaj regionoj, finfine ne utilas al multo.

La enkonduka raporto de la Konferenco indikas kuriozan fakton, jen ĝi estas, (sed notu bone, ke tio estas nura hipotezo), jen ĝi estas, ke se la kreskanta deficito de la pago-ekvilibrigo de la neindustriaj societoj povus esti haltigita je la nuna stato, kie ĝi troviĝas en 1964, tiam necesus tamen proksimume cent jaroj da penado kaj investadoj por atingi la hodiaŭan nivelon de la industriaj societoj okcident-eŭropaj. Nu, la pagobilanco de la neindustriaj societoj rapide malboniĝas, kaj la industriaj societoj jaron post jaro plipotenciĝas.

Kion fari ? Plej multaj solvoj aŭ nesolvoj estas proponataj. Ĉu ili alportos plibonigon al tiu ĵus priskribita situacio, la estonto decidos. Almenaŭ la merito de tiu Konferenco estas, ke por la unua fojo ekonomiistoj el la tuta mondo troviĝas en la sama diskutejo kaj diskutas.

La vidpunktoj treege malsimilas. Ili esprimiĝas en ofte tre interesaj raportoj, kiuj bedaŭrinde ofte estas akireblaj nur post granda pago. Tio interalie estas la fakto por la fundamenta raporto de Raoul Prebisch, la ĝenerala sekretario de la Konferenco. Tiu 150-paĝa dokumento, kiu estis dum la unua semajno la bazo de la diskutoj, ne estis eldonita de la eŭropa oficejo de Unuiĝintaj Nacioj, sed de eldonejo, kiu ĝin vendas je prezoj tro altaj, por ke simpluloj kiel ni povu ĝin aĉeti.

Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj por Komerco kaj Progreso

Claude Gacond, 77-a radioprelego, 1964.05.13 & 16

La proponoj de la ekonomiisto Raoul Prebisch estas trispecaj : Unue lia raporto proponas internaciajn fiksitajn prezojn por la krudaj varoj kaj aĉetaranĝojn, kiuj evitus subitajn katastrofajn interŝtatajn komercajn ŝanĝiĝojn. Due Raoul Prebisch proponas imposton pagatan en la industriaj landoj por la aĉetoj de krudaj varoj. La produkto de tiu imposto servus al la konstruo en la eksportanta lando de publike utilaj projektoj : hospitaloj, profesiaj lernejoj, elektraj baraĵoj, ktp. Trie Raoul Prebisch proponas doganajn privilegiojn individuajn por avantaĝi la landojn, kiuj industriiĝas kaj ne povas konkurenci la merkatojn de la aliaj jam industriigitaj landoj, kiuj sin protektas malantaŭ altaj doganaj tarifoj. Tiuj privilegioj permesus ekzemple subite doni laboron al miloj da senlaboruloj en tiuj landoj kiel Hindio, kie la teksindustrio estas malhelpata de la dogantarifoj de Usono, ekzemple.

La Konferenco pri Komerco en Ĝenevo klare montras, ke nia jarcento ne povos lasi multe pli longe la nunan ekonomian problemon sensolve. Ĝi ankaŭ montras, ke la interŝtata aŭ internacia organizo de la komerco de ĉiu nacio malpermesas racian planigon de la varointerŝanĝoj sur nia planedo. Ĉar nia jarcento ne kapablis solvi iujn problemojn post la unua mondmilito, ĝi kondukis al la ekonomia krizo de la jaroj 30-36-aj. Ŝajnas, ke alispeca, sed eble multe pli terura krizo nin atendas, se ni ne kapablos nun fari la necesajn kompromisojn inter la nacia aŭtonomeco kaj la organizo de tutplaneda registaro.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la **Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por la Komerco kaj Progreso**, kiu nun okazas en Ĝenevo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-